



KARINA OLIVEIRA

Lingvistikistino el Brazilo




Mi loĝas en
San-Paŭlo
ekde 2009,
sed dum mia
infanaĝo mi
vivis en eta
urbo nomata
Biritiba
Mirim.

En 2009 komencis mia universitata kurso. Ĝi daŭris kvin jarojn kaj duono (jes, estas longa kurso, kaj tre malfacila...) sed finfine en 2014 mi diplomiĝas.




Ekde la jaro 2012 mi partoprenas en la laboro de la estraro de EASP (Esperanto-Asocio de San-Paŭlo), kiel propaganda direktorino. Pro tio, mi intense partoprenas la organizadon de la renkontiĝoj de San-Paŭlo (renkontiĝo de la esperantistoj de la urbo kaj la ŝtata kongreso), kaj daŭrigas mian partoprenon en la aferoj de la asocio dum la jaro. Jen kelkaj fotoj de renkontiĝoj:



En la kongreso kiu okazis en 2013, mi gvidis metiejon pri volejbalo. Estis tre amuza afero. 😊 (Mi estas tiu kiu sidas plej dekstre)



Tiuj estas mi kaj Alekĉjo, francano kiu translokiĝis al Brazilo por vivi ĉi tie. Li prelegis (en esperanto) por miaj gelernantoj komence de 2013, por instigi ilin daŭrigi la kurson. Mi tradukis la prelegon, ĉar estis por komencantoj.




En la Zamenhofa festo 2012 (je la 15a de decembro) mi prelegis al esperantistoj pri la libro “Lingvaj respondoj”, verkita de Zamenhof, por omaĝi lin.



En 2012, post la ŝtata kongreso, estis farita filmo pri ĝi, en kiu mi aperas. Se vi volas vidi, jen la ligilo:

<https://www.youtube.com/watch?v=HYzCutAsQlo>

Mi aperas je 25 minutoj, kaj parolas dum 2 minutoj kaj duono pli malpli




Du-foje mi iris al Bona Espero, bieno kiu estas meze de Brazilo, zorgata de Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, konata de la plej multe de la esperantistoj. Mi laboris tie kiel volontulino, kaj tre ŝatis la sperton.



MI ankaŭ partoprenis nacian kongreson en la ŝtato Mato Grosso, en 2013.
Tie mi konis bonegajn esperantistojn, kiuj iĝis miaj personaj amikoj.



Ekde 2012, ankaŭ, mi disvastigas esperanton en mia universitato. Jen afiŝo kiun ĉiuj gelernantoj de la universitato ricevis per retmesaĝo kaj kiun estis gluita en pluraj lokoj tra la universitata urbo.





AMPLIE SEUS HORIZONTES
E SUA VISÃO DE MUNDO!

Curso de ESPERANTO



INSCRIÇÕES
até 12 de agosto de 2013




USP

INFORMAÇÕES:

<http://clinguas.fflch.usp.br/cursos/1015>



Mi partoprenas la instruistan trejnadon kiu okazas ene de la programo de la trijara kurso ĉe Poznano. Jen foto de la grupo (inkluzive de la trijara kurso) kaj fotoj kun du bonegaj amikinoj (unu polino kaj unu rusino), kiujn mi konis danke al la kurso.



Krom esperantumi, mi ŝatas ludi volejbalon, bicikli, promeni, kaj triki. ☺ Mi ŝategas naturajn lokojn, kun multe da arboj kaj trankvileco.

